# EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

**EKO 2023 / 38. Junio 28, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj (lingva kontrolo): Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 356 KB AMO 100: 148 KB:104 KB.
Sume: 544 KB.**

**temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipe koneblaj.**


## Kerna UN-laborgrupo pri lingvoj

La 12-an de junio 2023, la Komitato de Neregistaraj Organizoj (NROj) pri Lingvoj, kun la komitato de la Konferenco de NROj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj (konata kiel CoNGO) kaj la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, fakula reto de esploristoj kiuj specialiĝas pri multlingvismo, kune kun la Konstantaj Misioj de Andoro, Burundo, Ekvatora Gvineo, Ĝibutio, Hispanio kaj Kanado, kaj la Konstanta Observa Misio de la franc-parolantaj landoj, kunvokis specialan kunvenon kun gvidantoj de Unuiĝintaj Nacioj pri la temo 'Konstrui reciprokan kompreniĝon pere de multlingvismo'. La kunsido estis multlingva, kun simultana interpretado en la ses oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj (la angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa). Krome, Universala Esperanto-Asocio kunordigis provizon de interpretado en Esperanto, fare de la teamo Duncan Charters, István Ertl, Edmund Grimley Evans, kaj Adrian Tanner.

Tiu Komitato, kies prezidanto kaj vicprezidanto estas respektive la reprezentantoj de UEA al Unuiĝintaj Nacioj prof. Francis Hult (kunordiganto) kaj prof. Humphrey Tonkin, estis la ĉeforganizanto de la kunveno. Parolis pintaj gvidantoj de Unuiĝintaj Nacioj –s-ro Csaba Kőrösi, prezidanto de la 77-a Ĝenerala Asembleo de UN, s-ro Movses Abelian, la vic-sekretario por la Ĝeneral-asembleo kaj Kunordiganto de Multlingvismo; s-ro Miguel de Serpa Soares, Vic-sekretario pri Juraj Aferoj pri Politiko, kaj s-ino Lisa M. Buttenheim, Asista Ĝenerala Sekretario pri Subtenaj Operacioj. La kunvenon alparolis UN-ambasadoroj: Ekscelencoj s-ro Zéphyrin Maniratanga, **Burundo**, s-ro Anatolio Ndong Mba, **Ekvatora Gvineo,** s-ro Mohamed Siad Doualeh, **Ĝibutio,** s-ino Ana Jimenez de la Hoz, **Hispanio**; s-ro Robert Keith Rae, **Kanado,** s-ro Yuri Ariel Gala López, **Kubo**, s-ino Ana Paula Zacarias, Portugalio; kaj s-ino Ifigeneia Kontoleontos, konstanta observanto de la **Internacia Organizo de la Frankofonio**. Krome parolis s-ino Sofia Margaryan, konsilanto pri humanitaraj aferoj ĉe la Konstanta Misio de **Armenio**.

Esperantistaj parolantoj prof. Humphrey Tonkin de UEA, pastro Hans Becklin de TEJO, prof. Mark Fettes de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kaj la Universitato Simon Fraser, faris siajn rimarkojn en Esperanto. Aliaj parolantoj uzis la araban, anglan, francan, hispanan kaj rusan.

Prof. Tonkin legis la anglalingvajn rimarkojn de d-ro Liberato Bautista, prezidanto de la Konferenco de NROj, CoNGO. La kunveno reprezentas la plej fortikan ĝisnunan utiligon de Esperanto en kunveno de gvidantoj kaj koncernatoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Multlingvismo estas kerna al la laboro de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi efike plifortigas sekvadon de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj, inkluzive de la Celoj por Daŭripova Evoluigo.Oni registris la kunvenon, kaj la video estos spektebla perrete.

**PS**: La dokumento estas tradukita al la albana lingvo, danke al Bardhyl Selimi.

## APETO kun apetito por ekskurso

Por diversigi siajn aktivaĵojn kaj por pli bone koni tiujn, kiuj respondos al la aspiroj de la kursanoj, Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO) aranĝis lernigan viziton al la palaco de Lomeo dimanĉe, la 18-an de junio 2023. En la ekskurso partoprenis 15 plenkreskuloj kaj 2 infanoj. Bv. legi la tutan tekston en la afrika retpaĝaro per www.esperanto-afriko.org/2023/06/21/apeto-ekskursis-al-la-palaco-de-lomeo/

Adjevi Adje

# Pariza paradigmo proponata

Bonvolu trovi la programon de la ateliero Esperanto-Paradigmo III, kiu okazos la 5-an kaj 6-an de julio 2023 en Campus Condorcet, Parizo.

https://www.flipbookpdf.net/web/site/746b78a6de28a45bd2dabd172bc81960206327 5f202306.pdf.html#page/1

La renkonto estas malfermataj al ĉiuj. Laborlingvoj (sen traduko) estas la franca, germana, angla kaj Esperanto. Pri la serio de renkontoj (Berlino, 2021 kaj Bonn, 2022) vi povas legi ĉi-tie :

https://cak.ehess.fr/evenement/les-pratiques-transnationales-emancipatrices

Pascal Dubourg Glatigny

# Vortaro por la litovaj esperantistoj

Fine de majo aperis La Granda Esperanta-Litova vortaro de Petras Čeliauskas: 52 mil vortoj, 816 paĝoj, 1000 ekzempleroj. Legu pli en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto:* https://sezonoj.ru/2023/06/litovio-61/

# Kvar-minuta rigardo al Hispanio

Jen filmeto pri  la 80-a Hispana Kongreso de Esperanto en Comillas: https://youtu.be/Whh9HKpgmoI

mga

# La mondaj kristanoj kongresos en Pollando

La 72-a Kristana Esperanto-Kongreso de KELI, okazos de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2023 en la naskiĝloko de Ludoviko Zamenhof, Bjalistoko, Pollando. Ĝi

okazos en la Porpastra Seminario situanta en la urbocentro. La kongresa temo estas "Dialogo inter religioj". Legu pli ĉe:< www.espero.bialystok.pl >

La organizantoj KELI, Fondumo Zamenhof kaj Bjalistoka Eo-Societo deziras montri al vi multreligiecon kaj multkulturecon de la regiono Podlaĥio, ankaŭ dum la kongresaj kunsidoj ekster la urbo:

- *Pri hebreoj en la pitoreska urbeto Tykocin plena de hebreaj spuroj*
- *Pri ortodoksuloj en la fama urbeto Supraśl*
- *Pri katolikoj en la sanktejo Sankta Akvo*
- *Pri islamanoj en Kruszyniany*
- *2 tagojn ni oferos al la katolika kaj aliaj religioj surloke. Pli da informoj ĉe: https://espero.bialystok.pl/eo/keli/?v=9b7d173b068d*

Ela Karczewska

## La prezidanto de UEA mesaĝas al la Komitato

La Estraro proponas al la Komitato de UEA ĉi-jare organizi la Komitatajn Forumojn laŭ la kvar agadkampoj indikitaj de la prezidanto en la junia numero de la revuo *Esperanto.* Laŭ ĝisnunaj diskutoj en diversaj forumoj, ŝajnas ke ni havas konsenton ke tiuj kvar agadkampoj estas unue facile kompreneblaj, kaj due la plej kernaj por decidoj rilate la prioritatojn de UEA. Pro tio vi vidos en la Tagordo por la Komitataj Kunsidoj la jenan disdividon por la 4 Komitataj Forumoj, laŭ mia resumo de la junia artikolo aperonta en la julia-aŭgusta numeroj de nia revuo. Ni tamen uzu la jenan ordon, kiu donas la akronimon KIRI, kunigas nature 2 kaj 3, kaj lasas la lastan por kunlaboro kun nia partnero ILEI, kiu jam diskonigis sian laborplanon.

1. **K**apablo kunlabori - esenca kondiĉo por progreso
2. **I**nformado pri nia lingvo kaj komunumo
3. **R**ilatoj kun la ekstera mondo
4. **I**nstruado kaj lernado de Esperanto

## Ekzamenaj atingoj en 2023

Inter la 3-a kaj la 18-a de junio la KER-Ekzamena Centro de UEA organizis retajn ekzamenojn je la niveloj B1, B2 kaj C1. La plej multaj kandidatoj venis el Aŭstralio!




Legu detale ĉe la paĝo: https://edukado.net/novajhoj?id=895

La grupaj sesioj okazis sabate kaj dimanĉe, en tri sinsekvaj semajnfinoj, kaj la individuaj parolintervjuoj (kie la ekzamenantoj unuope parolis kun ĉiu kandidato dum 20-25 minutoj) estis plej ofte vendrede kaj lunde. El la ekzameniĝintaj 63 kandidatoj fine sukcesis 56. Ili loĝas en 19 landoj dise en la mondo.

## Kostarika agado en Universitato

Mesaĝas Antonio Leoni: “Mi denove instruos Esperanton en la Universitato de Kostariko en la dua semestro de tiu ĉi jaro (de aŭgusto ĝis novembro) por la tria sinsekva jaro. Eble ĉi-foje estos malpli da partoprenantoj pro administra eraro, tiel ke

ĝi estos alirebla nur por gestudentoj pri Filologio, Lingvistiko kaj Literaturo (pasintfoje ĝi estis malfermita por gestudentoj de iu ajn fako). Kiel en antaŭaj okazoj, la iniciato okazigi la Eo-kurson venis de la sekciestro pri lingvistiko.

## Membro de la Afrika Komisiono ricevas honorigon



Miora RAVELOHARISON el Madagaskaro fariĝas Doktorino. Ŝi sukcese atingis tiun titolon kun mencio "tre honoroplena" kaj estis la plej bona de sia tuta grupo. Ŝi doktoriĝis pri teologio, estante pastorino. Jen valora membro en la Afrika Komisiono de UEA.

Anoncas Mireille Grosjean

## Gvidilo pri la Tago de Esperanto

La reta revuo de UEA kaj Humprey Tonkin diras al ni, kion fari la 26-an de julio:

https://revuoesperanto.org/esperanto-tago-2023

## IKEF atingas Eŭropon

En sia kunsido de la 25-a de junio IKEF bonvenigis partoprenantojn en Eŭropo, pli precize el Hungario, kiam Jószef Marton parolis laŭ la temo 'Sano, sukceso kaj Esperanto'. IKEF havas la belan pozicion agi ĉefe en ne-eŭropaj mondpartoj. Do, laŭdinda estas tiu movo al la tradicia centro de nia movado.

## Legu pri la germana kongreso

Fine de majo en Braunschweig okazis la centa Germana Esperanto-Kongreso kun pli ol ducent partoprenantoj kaj riĉa programo. Legu prian artikolon de Ulrich Brandenburg en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto*
https://sezonoj.ru/2023/06/germanujo-21/

*Noto: Ni alkroĉas denove la tekston pri AMO 100 pro korektoj de Mirejo Grosjean, kiun SMG preteratentis.*

============== 1220 vortoj =============

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.: La kolekto de EKO:

https://www.ilei.info/agado/EKO.php por 2023 (ĝis 30.).

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.